

Latinigo

1

ENHAVO

La evoluo de latiniga skribado en Japanujo kaj ia decido de oficiala ortografio	Tanakadate-A.	2
La observeto al japana latinigio	Grenspiko	6
La nuna stato de japana skribsistemo	Hidek.	8
Latinigo de Ĉina skribo kiel nepra paŝo de lingva evoluo	H. Symo	17
La latiniga movado dum foririnta unu jaro en Pejpingo	Odeno	24
Latiniga movado de Ĉina lingvo en Siamio	Lu Bi	30
La latinigo de anama lingvo	Hidek.	32
La informeto pri nuntempa sovetia latiniga movado	Tas Novaja Agentejo	34
Ĉu en Sovetio oni latinigas la dialektojn?	V. Kulĉinski	35
La latina kaj germana alfabetoj en Germanio	Kuwaki-G.	36
Eĥoj		39
De la redaktoro		41
Sciigoj		42

* Pri nia adreso, la prezo de la gazeto ktp. vidu p. 29.

LA EVOLUO DE LATINIGA SKRIBADO EN JAPANUJO KAJ LA DECIDO DE OFICIALA ORTOGRAFIO

• • • D-ro Tanakadate-Aikitu
resumite tradukis Isiga-Osamu

1936-a jaro faris epokon en la latiniga movado de Japanujo pro tio ke la Enketkomitato de Latiniga Sistemo, speciale enoficigita de la japana registaro, decidis la oficialan ortografion de la japana vorto (ne lingvo)⁽¹⁾ bazita sur Nippon-a sistemo. Sube mi donos resume la priskribon de gravaj okazintaĵoj el la historio de latinigado de l' japana lingvo de la komenco ĝis la decidofaro.

La japana lingvo unuafoje estis latinigita de kristanaj misiistoj (16-a c.). Ilia ortografia sistemo estis portugala, kiu enhavis Q, V, X, ktp kaj rimarkinde malsamas ol la posttempaj sistemoj⁽²⁾. La sistemo tamen baldaŭ preskaŭ tute pereis pro la severa malpermeso de kristanismo.

Dua venis la nederlanda sistemo kiu uzis OE anstataŭ U, J anst. Y kaj kelkfoje L kaj V anst. R kaj H. Ĝi estis la sola sistemo en ĉi la mezo de Tokugawa epoko (1607 - 1867). Oni povas diri ke Nippon-a sistemo nuntempa jam ekgermis en tiu epoko, ĉar kelkaj tiamaĵ studentoj de la nederlanda lingvo kuraĝe anstataŭigis OE per U kaj forĵetis el TSI aŭ TSU

* La enkrampigitaj vortoj estas parentezoj de l' tradukinto.

1) La kompleta regularo por skribi la japanan lingvon per la latinaj literoj ne estas farita. Oni decidis sole la ortografion de ĉiu aparta vorto. Trad.

2) Ekzemplo laŭ la portugala sistemo: Nifon no kotoba to historia vo narai xiran to fossuvv fito no tameni xeve ni yavaragetarv feiqe-no monogatari. (Laŭ Nippon-a sistemo: Nihon no Kotoba to Historia wo narai siran to hossuru Hito no tameni Sewa ni yawaragetaru Heike no Monogatari.) Trad.

la literon S, kiu montris paletaliĝon, opiniante ke la sonvaloroj de tiu ĉi literoj en la japana lingvo malsamas ol tiuj en fremdaj lingvoj.

Depost la lastaj jaroj de Tokugawā epoko venis en Japanujon diversaj nacioj kaj ili skribis la japanan lingvon per sia propra sistemo laŭ la juĝo de siaj oreloj. Francoj skribis ウ (U en Nippon-a sistemo) per OU, シ (SI - N.s.) per CHI; germanoj ト (TI - N.s.) per TSCHI, ド (DI - N.s.) per DSI, ktp. Inter tiaj sistemoj, tamen, la plej supera estis la angla sistemo pro ĝia influo en la edukado kaj komerca societoj kaj kun la fama vortaro de d-ro Hepburn la sistemo tre disvastiĝis en la nomo de Hepburn-a sistemo.

Kiam en 1883 latiniga societo estis fondita kun la celo reformi nacian literon, ĝi alprenis la sistemon Hepburn-an. Tio estas ne mirinda, ĉar tiama socia stato estis tiel, kiel ĉio eŭropema estis prenata sen ia kritiko. Sed baldaŭ aperis nemultaj sinceraj amantoj de la nacia lingvo (ilia gvidanto estis d-ro Tanakadate), kiuj, akcentante la gravecon de la naciaj frazeologio kaj gramatiko en la decido de ortografio kaj pliboniginte la sistemon elpensitan de la studentoj de la nederlanda lingvo, decidis t.n. Nippon-an sistemon. En la komenco la nombro de la adeptoj de Nippon-a sistemo estis tre malgranda, sed ili senĉese batalis por sia sistemo, grupigis samideanojn, kompilis lernolibrojn kaj eldonadis diversajn legaĵojn laŭ sia sistemo, ĝis kiam jurpersona korporacio kun la miloj da membroj estis organizita por la propagando de l' sistemo kaj eĉ tezo por doktoreco estis skribita per la sistemo. Ankaŭ en oficialaj dokumentoj, kiel la raporto de Centra Meteorologia Observatorio, la internacia landkarto de Termezura Oficejo, kaj la navigacia karto de Hidrografia Oficejo, estas uzita Nippon-a sistemo, kaj fremdaj aŭtoritatuloj, kiel prof. Daniel Jones.

prof. Jespersen, prof. Trubetskoj, Sir Sansom de Brita Ambasadorejo en Japanujo, d-ro Gundert, kaj d-ro Palmer, la lingvistika konsilanto de japana Ministrejo de Edukado, (kaj ankaŭ prof. Spalwin de Sovetia Ambasadorejo), subtenas tiun ĉi sistemon.

Pro la multaj maloportunaĵoj, kiujn rezultigas la uzo de la du sistemoj, Nippon-a kaj Hepburn-a, la japana registaro estis devigita starigi komitaton per dekreto kun la celo decidi la oficialan sistemon.

La komitato konsistanta el 42 komitatanoj inkluzivis sciencistojn en la fako, fervorajn moradistojn, vicministroyojn el ĉiu ministrejo, fakĉefojn de la koncernaj oficejoj. Post dekfojaj ĝeneralaj kunvenoj la komitato decidis komisi al tri sinsekvaj esploraj komitatetoj pluan studadon.

La unua Esplorkomitatanaro komisiita fari teoriant pristudon konsistis el ses komitatanoj, elektitaj po du el la insistantoj de Nippon-a, kaj Hepburn-a sistemoj kaj neŭtraluloj, kaj ĝi kunvenis dekdu fojojn. La argumentado estis farita ĉefe super la voĉo, pri kiu tamen neniu koincido de opinioj estis ebla, ĉar ĉies observo kaj prijuĝo malharmonis. Fine fizika eksperimento estis komisiita al fizikistoj. La eksperimento per sonfilmo de s-ro Taguti, membro de Esplorinstituto por Fiziko kaj Kemio, montris interesan fakton: la vortoj skribitaj laŭ Nippon-a sistemo estis legitaj de la fino returnen por esti registrita sur filmo kaj poste la filmo estis projekciita returnen; tiam la parolataj vortoj donis ĝustan sonimpreson⁽¹⁾. Pro tio estis pruvite ke unu latina litero prezentas unu fonemon. Cetere el la filmo, sur kiu estis registrita kuntiritaj sonoj, KYA, SYA, TYA, ktp.⁽²⁾ oni

1) Oni registris interalie la vorton ezakutama kaj la returnen-kuranta filmo eligis sonon: Amatukaze. ... Trad.

2) Laŭ Hepburn-a sistemo: KYA, SHA, CHA, Trad.

povis eligi ĉiu aparte konsonanton, vokalon, kaj duonvokalon, ŝmirekovrante la parton de l' filmo per tufo. Tiam saman rezultaton ne povas doni Hepburn-a sistemo. S-ro Taguti ankaŭ sukcesis eligi senvoĉajn sonojn, K kaj T, el la filmo kiu registris la voĉajn sonojn, G kaj D, ŝmirekovrinte unu parton de l' filmo. La unua Esplorkomitatano raportis kelke da konkludoj al la ĝenerala komitato; unu el la konkludoj estas: « Ni konsentas ke Nippon-a sistemo estas teorie sen kontraŭeco. » kaj ĝin substrekis ankaŭ la reprezentantoj el Hepburn-a sistemo kun grandanimo. La komitato komisiis al la Dua Esplorkomitatano la studon de la tradicia kaj praktika flankoj. La komitatano, konsistanta el ses unuaj komitatoj kaj du novaj, post dek kunvenoj akceptis suban rezolucion unuanime.

1) Estas tre malfacile decidi kiu sistemo inter la du estas pli potenca: Hepburn-a sistemo estas potenca inter la uzantoj de la angla lingvo dum Nippon-a, en kelke da ŝtataj oficejoj.

2) Hepburn-a sistemo estis supera en Meidi epoko kaj Nippon-a estas superanta en lastaj jaroj.

3) La skribo de fremdaj vortoj povas diferenci laŭ situacio, sed ankoraŭ ne sufiĉe kunfandiĝintajn vortojn de alilingva deveno oni skribu laŭeble en la propra ortografio.

Al la Tria Esplorkomitatano konsistanta el dek komitatoj, ĉefe neŭtraluloj kaj du specialistoj, estis komisiite fari decidan projekton laŭ la vidpunkto socia kaj politika, konsultante la antaŭajn rezoluciojn. La Esplorkomitatano invitis la reprezentanton el ĉiu ministrejo kaj demandis pri oportuneco en la flanko de la ministrejo ĉe la alprenado de unu el la du sistemoj. Post tio ĝi decidis alpreni Nippon-an sistemon kun iom da ŝanĝo: anstataŭigi D antaŭ (daŭrez el la malsupra parto de la sekventa paĝo) — 5 —



LA OBSERVETO AL JAPANA LATINIGO

Grenspiko

Antaŭ ĉio mi avertas al legantoj ke mi ankoraŭ ne estas la movadisto de latinigo. Do konsiderante tion, legu jenan artikolon.

Sub kia ideo marŝas la japana latiniga movado? Bedaŭrinde mi bone scias tion. Preskaŭ ĉiuj latinigistoj bone scias ke la latinigo antaŭ ĉio estas nepre necesas en la punkto, kie oni povas poligi japanan lingvon kaj

plialtigi lernitecon de ĉiuj. Sed ofte okazas tiaj aferoj, ke oni ne povus iri sur la celita vojo. Nun mi ne riproĉas nur tion.

Estas tute klaŭinde ke iafoje troviĝas en la latinigo plene kontraŭa ideo kun la popola latinigideo.

La centro de japana latiniga movado estas Japana Latiniga Asocio, kiu ĉiumonate eldonas kiel la organon. «Latiniga Mondo» (Rēmazi Se-

la vokaloj. I, Y kaj U, per Z. Tiu ĉi anstataŭaĵo jam estis permesita en Nippon-a sistemo kaj estis uzata en multaj vortaroj.

La ĝenerala kunveno de Enketkomitato post dufojaĵ diskutadoj super la projekto decidis alpreni tion ĉi sistemon kaj la reprezentantoj de ĉiuj ministrejoj konsentis ĝian praktikon. La problemoj kiu ĉagrenis multajn instruitulojn dum la lastaj kelkaj jaroj estas fine solvita. De nun ni, forgesinte ĝisnunan disputadon, ĉiuj kune povos marŝi antaŭen por solvi la novan problemon: la reformo de l' nacia lingvo mem.

(eljapanigis)

kaj), en kiu oni skribas en latinlitero diversajn aferojn. Kaj en tiu de tempo al tempo aperas artikoloj faŝismaj kaj ŝovinismaj. Pri ke Japanio kaj Koreio estas originale idetaĵ, do ke korea lingvo estas konkerata de japana, estas oportuna ne nur por japano, sed ankaŭ koreo. Pri ke la normala frazo de faŝistoj ke la unuiĝo de Japanio kaj Manĉukuo kondukos orienton al poreterna paco. Aŭ pri ke kapitalistaro kaj laboristaro devas iri mano en mano, Ktp.

Estas tre strange ke inter la latinigistoj kiuj devas ekzili la popolon el la kateno de malfacila skribo, troviĝas tiaj faŝistoj, kiuj devas malhelpi la prosperadon de kulturo. Cetere iuj latinigistoj deklaras: «Japananlingvon en la mondon!», tiu ĉi frazo troviĝas en la himno de la japana latinigo. Kion tio signifas? Tio eble estas ke oni japanan lingvon disvastigu, devige enpenetru en la mondon? Tiu deziro plene koincidas kun la volo de faŝistoj.

La latinigo de japana skribo nature multe plialtigas la situacion de japana lingvo en la mondo. Se la frazo tiel signifas, mi nenion diras. Strange latinigistoj ĉirkaŭ mi ne respondas pri la signifo.


Malgraŭ ĉio, fakte troviĝas iom da faŝistaj latinigistoj. Posedantoj de konsciencoj neniam uniĝu kun faŝistoj sed forpelu ilin aŭ instruu al ili ĝis ili estas konvinkitaj pri la kvintesenco de la latinigo!

Ĉinaj kaj Japanaj k-doj!

Ni deziras scii pri la latinigado en la orientaj landoj: Sovetio, Ekstera Mongolio, Kamboĝo, Siamio, Hindio, Nederlanda Hindio, Filipinoj kaj... Se vi scias pri tio, informu al ni. Seeble, konatigu al ni tiean latinigiston.

— Redaktejo —





LA NUNA STATO de JAPANA SKRIBSISTEMO

Hi dek.

La japano uzas la miksitan skribsistemon, kiu konsistas de ĉina skribo k japanana litero. Mi pri-
diros unue pri la ĉina skribo k poste pri la japa-
na litero.

La ĉinan skribon niaj prauloj importis de Ĉinio en antik-
va epoko. La japano daŭre uzadis la skribon de tiu epoko
ĝis nun, dum dekelkaj jarcentoj. Preskaŭ ĉiuj el la skri-
bo, kiun ni uzas, estas tute komunaj kun tio, kiun la ĉino
nun uzas. Tamen kelkdek da la «ĉinaj skriboj» en nia
lando, estas kreitaj de la japano mem, imitante la ĉinan
skribon. Ekz. 鉄 (vinkto), 鐘 (lanko), 俤 (rikso), 鰯
(sardino), 辻 (vojkruciĝo) ktp. estas ĉiuj japanaj «ĉinaj
skriboj».

La japano skribas kelkajn el la skriboj laŭ malsama
skribformo ol la ĉino, kvankam la skribformo verŝajne
devenas de tute sama origino. Ekz.:-

en Japanio	en Ĉinio	signifo
氷	冰	glacio
插	插	meti inter
殺	煞	morti
驗	驗	esplori
群	羣	grupo

Kiom estas la tuta sumo de la ĉina skribo, neniuj scias.
Laŭ onidiro tio atingas al 50 aŭ 80 mil. En japana pre-
sejo oni provizias ĝenerale 6,000 – 10,000 da la skriboj;
japana skribmaŝino havas 3,126 (sekve ĝi postulas ĉ. kvin-

oblan horon ol latin-alfabeta skribmaŝino); en popularaj ĵurnaloj oni uzas 2,100 — 3,600; en elementa lernejo oni instruas al lerneĵano 1,360, el kiuj nur ĉ. 500 geknaboj eblas skribi parkere.

La ĉina skribo estas ĝenerale nomata ideografiaĵo. Tamen el ĝi pura ideografiaĵo estas relative malmulta, k la plejparto enhavas fonografiaĵeman elementon. Unuvorte la ĉina skribo situacias inter ideografiaĵo k fonografiaĵo. En plejmulta okazo la signifo, kiun esprimas la skribo, estas komuna almenaŭ proksima unu la alian inter Japanio k Ĉinio.

En Ĉinio unu skribo esprimas unu silabon, sed en nia lando unu, du, tri aŭ pli multe konforme al okazoj. Preskaŭ ĉiu ĉina skribo havas pure japanajn elparoladojn t.n. «kun» k ĉindevenajn elparoladojn t.n. «on»: ekz. 文 (skribaĵo) estas elparolata humi laŭ «kun», k bun aŭ mon laŭ «on». Unu ĉina skribo hava du, tri aŭ pli multe da elparoladojn: ekz. 生 (naski ka.) havas 165 elparoladojn! Tamen ni ne havas liberon legi la ĉinan skribon en vorto aŭ frazo laŭ ŝatata el keikaj aŭ multaj elparoladoj, ĉar la elparolado estas difinita de antaŭaj, k postaj skriboj: ekz. kvankam 生 havas tiel multe da elparoladoj, 平生 (ĉiutage) ni devas legi hejzej, 長生 (longviveco) — nagaiki. Sekve la elparolado de la ĉina skribo en Japanio estas tre komplika k malfacile lenebla ol tio en Ĉinio.

La ĉina skribo donadis grandan influon k sangojn al la japana lingvo dum longa tempo, dekelkaj jarcentoj. Tio estas sendube, ke ĝi servis al la japano kiel importilo de ĉina kulturo, sed tio estas ankaŭ sendube, ke ĝi influis malbone k eĉ kripligis nian lingvon. Mi prezentos jene kelkajn ekzemplojn de la malbonaj influoj.

(1) Ĉindevena vorto tro potencigas, k uzurpas k pelas la pure japanan popularan vorton, kiu estas pli intima k pli

facile komprenebla por popolamaso. Kiel la kaŭzo de tiu ĉi fenomeno ni devas kalkuli la absorbiĝon al ĉina kulturo, de la japano, precipe japana reganta klaso, sed kiel aliankaŭzon ni ne povas forlasi la ĉinan skribon. La japano kutimas skribi substantivojn, k radikojn de adjektivo, verbo k adverbo: unuvorte la gravajn partojn el la lingvo per ĉina skribo; k partikulojn k konjugacian parton: unuvorte relative negravajn partojn per la japana litero. En ne malmulte da okazoj oni skribas malfacile la pure japanan vorton per la ĉina skribo, tial oni uzas la ĉindevenan vorton, kiun oni povas facile skribi per la ĉina skribo, anstataŭ la pure japana vorto. Oni ofte uzas rikaishuru (kompreni), kettejsuru (difini), jacjokusuru (helpi), jocina (facila) k konnanna (malfacila) anstataŭ la pure japanaj popularaj vortoj: ŭakarū, kimieru, sukeru, tajasui k muzukoŝii. Tiel unuflanke la ĉindevena vorto prosperiĝas k aliflanke la pure japana vorto malprosperiĝas sen prava kialo.

(2) La pure japana vorto ne malofte ŝanĝiĝas tra la ĉina skribo, al la ĉinaaspekta vorto, kiu estas pli malfacile komprenebla por la popolamaso. Ekz.:-

kazaguruma → huŝa (ventorado)

hikazu → nissuu (numero de tagoj)

aŝiato → sokuseki (postsigno)

kajoiĉoo → cuuĉoo. (registrolibro, ŝparlibro)

ĉingaŝi → ĉintaj- (luigo)

(3) La ĉina skribo tre pligas homonimon en la japana lingvo. La japano ankaŭ, kiel la ĉino, kreas novan vorton, kummetinte du ĉinajn skribojn. Unue la elparoladoj esprimataj de la ĉina skribo estas limigitaj en nombro, k due oni kreas la novan vorton, preskaŭ ne atentante la voĉan elparoladon (pro ke la ĉina skribo ne esprimas tiel videble, ^{voĉan elparoladon} kiel latina alfabeto), pro tiu ĉi ambaŭ kaŭzoj

la homonimo plimultiĝas tagon post tago. Ekz. ni havas pli ol 15 da kikan, pli ol 12 da ŝisej k. respektive pli ol 5 da kooi k. kjuuŝi. La diferencojn inter tiuj ĉi homonimoj ni povas facile distingi, se ni vidas per la okuloj la vortojn skribitajn, sed ni faras tion malfacile aŭ tute ne eblas fari tion, aŭskultinte per la oreloj la vortojn elparolitajn de buŝo. La japana lingvo estas ŝanĝiĝanta pli k. pli de lingvo por aŭskulti al lingvo por vidi.

(4) En la japana lingvo troviĝas la vorto, kies elparolado estas nestabila. La kaŭzo de la nestabileco estas en tio, ke unu ĉina skribo havas kelkajn elparoladojn, sed ne unu. Ekz. 數 (numero) oni povas elparoli aŭ zu aŭ zuo, tial 人数 (numero de homoj) estas elparolita du maniere: ninzu k. ninzuo. Oni juĝas malfacile, kiu el tiu ĉi ambaŭ estas ĝusta. Mi montras jene kelke da similaj ekzemploj:-

産額	sangaku	aŭ	sankaku	(produktkvanto)
送達	soodacu	"	sootacu	(transdoni)
知音	ĉiin	"	ĉion	(intima amiko)
逐電	ĉikuten	"	ĉikuden	(forkuri)
供奉員	gubuin	"	kubuin	(akompanentaro)

x x x

La japanan literon ni nomas «kana». Nia praulo kreis la japanan literon, baziginte la ĉinan skribon. La japana litero ĉiam esprimas unu silabon: ekz. 力 — ka, シ — ŝi. Ni dividas la literon je du specoj: «katekana» k. «hiragana», kiuj respektive nombras 48.

Oni kreis la katakana'on, elpreninte parton aŭ tuton de la kvadrata stilo de la ĉina skribo: ekz. per la maldekstra parto de 冫 oni kreis 冫 (a) k. per la dekstra parto de 冫 — 乚 (e); per la tuto de 𠂇 — 𠂇 (ĉi) k. per la tuto de 二 — 二 (ni). Oni kreis la hiragana'on, elpreninte la kursivon de la ĉina skribo:-

kuĉorata stilo kursivo hiragana'o

以 → い → i (i)

渡 → 渡 → は (ha)

ĉina skribo

Mi montras jene du specojn de la japana litero.

KATAKANA									
ア	a	イ	i	ウ	u	エ	e	オ	o
カ	ka	キ	ki	ク	ku	ケ	ke	コ	ko
サ	sa	シ	si	ス	su	セ	se	ソ	so
タ	ta	チ	ci	ツ	cu	テ	te	ト	to
ナ	na	ニ	ni	ヌ	nu	ネ	ne	ノ	no
ハ	ha	ヒ	hi	フ	fu	ヘ	he	ホ	ho
マ	ma	ミ	mi	ム	mu	メ	me	モ	mo
ヤ	ja			ユ	ju			ヨ	jo
ラ	ra	リ	ri	ル	ru	レ	re	ロ	ro
ワ	wa	ヰ	i			ヱ	e	ヲ	o
ン	n								
HIRAGANA									
あ	a	い	i	う	u	え	e	お	o
か	ka	き	ki	く	ku	け	ke	こ	ko
さ	sa	し	si	す	su	せ	se	そ	so
た	ta	ち	ci	つ	cu	て	te	と	to
な	na	に	ni	ぬ	nu	ね	ne	の	no
は	ha	ひ	hi	ふ	fu	へ	he	ほ	ho
ま	ma	み	mi	む	mu	め	me	も	mo
や	ja			ゆ	ju			よ	jo
ら	ra	り	ri	る	ru	れ	re	ろ	ro
わ	wa	ゐ	i			ゑ	e	を	o
ん	n								

Krome la japana litero havas du signojn : t.n. « malklari-

gajn punktojn » (・) k rondeton (◦). Aldoni la malklarigajn punktojn al カ, キ, ク, ケ, コ k aliaj literoj, k la rondeton al ハ, ヒ, フ, ヘ, ホ, oni povas iom ŝanĝi la elparoladojn esprimitajn de tiuj ĉi literoj :-

カ	キ	ク	ケ	コ	バ	ビ	ブ	ベ	ボ
ga	gi	gu	ge	go	ba	bi	bu	be	bo
ザ	ジ	ズ	ゼ	ゾ					
za	ji	zu	ze	zo					
ダ	ヂ	ヅ	デ	ド	パ	ピ	プ	ペ	ポ
da	ji	zu	de	do	pa	pi	pu	pe	po

Oni povas aldoni la signojn al la hiragana'o ankaŭ.

La ortografio de la japana litero, laŭ kiu ĉiuj ĝeneralaj skribaĵoj estas faritaj, ne ĉiam konformiĝas kun la parola lingvo de nuna tempo. Ekz. はふりつ (leĝo) estas elparolita hooricu, malgraŭ laŭlitere hohuricu, k ほのほ (flamo) estas honoo, malgraŭ laŭlitere hohohu, krome かふふ estas koohu (laŭlit. kahuhu) k どうでふ estas juufoo (laŭlit. jiudehu) [ambaŭ loknumoj]. Sinsekve nenia erudiciulo povas literitute senerare la japanan lingvon per la ortografio. La ortografio malhelpas lernejanon ellerni nian lingvon k popoloj amason aperigi sian opinion per skribaĵo. Tial iuj persistas k eĉ praktikas la novan ortografion konformiĝantan al la parola lingvo. Sed ilia movado sukcesis ne sufiĉe, ĉar konservatulo obstine kontraŭas al la reformo kiel al ĉiuj aliaj reformoj. Antaŭ kelkaj jaroj la Departemento de Popola Edukado ne povis ne rezigni enporti la novan ortografion de la japana litero en la ŝtatan lecionlibron de elementa lernejo, pro la obstina kontraŭstaro de la konservatulo.

x x x

Krom la ĉina skribo k japana litero ni uzas araban ciferon k latinliteron en la nuna skribsistemo. La araban ciferon komprenas la tuta nacio, ĉar la lasta ellernas ĝin

en la elementa lernejo. En horizontale skribita skribaĵo ni uzas la ciferon ek pli ofte ol ĉino. Tamen ni ankoraŭ uzas ĉinan ciferon precipe en vertikale skribita skribaĵo, ĉar la araba ĉifero estas ne taŭga por tiu skribaĵo.

En la elementa lernejo, depost la elprenado de metra sistemo, oni instruas la latinliteron kiel ne la ortografion de nia lingvo, sed mallongigitajn alfabetumojn de metro, gramo, litro ktp., unuvorte la terminaro de la metra sistemo. Ĉiu lernanto de mezgrada aŭ pli supra lernejo komprenas la latinliteron pro ke li lernas anglan aŭ alian fremdan lingvon literitan per la latinlitero. La japana registaro tamen instruas la ortografion de nia lingvo per la latinlitero en nenia lernejo, kvankam latinigisto ofte instruas la ortografion per latinlitero al lerneĵano, precipe la geknaboj de la elementa lernejo.

x x x

En la japana skribsistemo oni skribas la pli gravajn partojn el nia lingvo: substantivon, radikojn de adjektivo k verbo ktp. per la ĉina skribo; k la malpli gravajn partojn per la japana litero. Tamen troviĝas nenia severa regulo, ĉu oni devas skribi difinitan vorton per aŭ la ĉina skribo aŭ la japana litero. Sekve tute sama vorto estas diverse literita konforme al persono k tempo. Ekz. ĉareĉare (ni) estas literita per aŭ la ĉina skribo 我々, aŭ la japana litero われわれ.

Oni uzas la hiragana'on krom la ĉina skribo en ĝenerala skribaĵo, sed ne katakana'on, k la lastan plejparte por la vorto deveninta el fremda lingvo (escepte ĉindevena vorto).

Japano ĝenerale skribas vertikale komence de dekstra flanko, kiel la ĉino. Tiam skribmanieron ni nomas simple «vertikala skribo». Oni faras libron, gazeton, ĵurnalon k aliajn skribaĵojn laŭ la vertikala skribo. K ni

nomas horizontalan (eŭropeman) skribmanieron simple «horizontala skribo». Antaŭ Meĵji Revolucio (1868) la horizontala skribo tute ne ekzistis en nia lando, sed post tiam la skribmaniero komenciĝis k pliiĝis pli k pli pro la influo de eŭropa skribmaniero. En nuntempo precipe la eldonaĵo de natura scienco: fiziko, kemio, medicino, inĝeniera scienco, matematiko, ktp. estas presita horizontale. Unu parto el lingvo-sciencaj eldonaĵoj estas presita vertikale k alia parto — horizontale. En reklamo el ĵurnalo la horizontala skribo pliiĝas pli k pli, malgraŭ ke la novaĵo en ĝi estas presita ankoraŭ vertikale.

x

x

x

Mi tie ĉi finas la skizon pri la japana skribsistemo. Jen kelkajn ekzemplojn de la malfacilaj lernebleco k komprenebleco de la skribsistemo.

(1) Ĝis tiam, kiam oni povas libere legi (nur legi, sed ne kompreni) ĵurnalon, la japano bezonas lernadi dum ĉ. ok jaroj, dum la anglo dum nur unu jaro k duono. Tie ĉi ni ne povas forlasi tion, ke la japano pasigas por la kurso de nacia lingvo pli longajn horojn ol la anglo en elementa lernejo: la japano — 11 horojn k 20 minutojn, sed la anglo — 8 horojn, en ĉiu semajno.

(2) La japana popolamaso povas legi ne komplete la deklaron al la tuta nacio, de ministro. Ni povas legi ne komplete leĝojn ankaŭ, kvamkam la japana leĝo regulas: «oni ne povas konkludi tion, ke tiu, kiu krimis, ne volis krimi, eĉ se li ne konas la leĝon.». Tie ĉi mi devas noti, ke la deklaro, la leĝoj k aliaj oficialaj skribaĵoj estas faritaj per la tre malfacile komprenebla ĉina skribo (miksita kun la japana litero) k per la imit-klasika stilo, kiuj estas preskaŭ fremdaj per la popolamaso.

(3) La japano ne povas legi ne erare ne malmutan parton de loknomoj k personnomoj, unuvorte propraj nomoj. ĉar

en la propra nomo oni uzas tre arbitre la ĉinan skribon. La japano ĉiu nomas la mortintan faman ĉefministron 原敬, hara-kej, sed ĝia vera nomo estas hara-takaŝi.

(4) La japana blindulo finas post tri jaroj k kvar monatoj la tutan kurson de elementa lernejo, por kiu la ĝeneralulo bezonas ses jarojn, ĉar la ĝeneralulo elspezas multajn homojn por la ĉina skribo k la du specoj de la japana litero, sed la blindulo ellernas nur brajlon facile akireblan.

(5) La japano elspezas ĉ 100 milionajn jenojn por la edukado de la nuna skribsistemo en la elementa lernejo en ĉiu jaro. El kie ni eltiris tiun ĉi ciferon? Se ni uzus nur fonografajn, ekz. latinan alfabeton anstataŭ la nunanskrib-sistemon, ni povas fini almenaŭ post kvar jaroj la tutan kurson de elementa lernejo, por kiu ni elspezas nun ses jarojn. Niaj registaro k komunumoj elspezas ĉ. 300 milionajn jenojn por la edukado dum unu jaro. Do, ni povas ŝpari ĉ. 100 milionajn jenojn, se ni akceptos la latinan alfabeton anstataŭ la nunanskribaĉon.

x

x

x

Resume la nuna japana skribsistemo estas ne nur neoportuna sed malutila por la popolamaso pro la jenaj du gravaj kialoj : unue ĝi dividiĝis distinge la literaturan lingvon de la parola lingvo ; due ĝi rifuzas la popolamason partopreni al la kreo k kreskigo de la literatura lingvo, k ĝi servas ja kiel la malsaĝigilo por popolamaso.

P.S. Mi literis japanajn vortojn laŭ esp-a ortografio, sed ne nacia ortografio, por ke ĉiuj legantoj povu elparoli ilin.

Abonu k abonigu « Latinigon » !



LATINIGO de ĈINA SKRIBO

KIEI NEPRA PAŜO DE LINGVA
EVOLUO

H. Symo

- 1 -

Depost kiam la latinigo movado ekvivis en Ĉinio, la teoria agado de ĝi ĉiam estis kiel estas la plej postresta kompare kun ĉiuj aliaj.

Ĝis hodiaŭ, inter multaj simpatiantoj, partoprenantoj kaj teoriuloj de tiu ĉi movado ekzistas ankoraŭ diversaj malĝustaj komprenoj al ĝi. Kaj el tiuj, la plej danĝera, plej efika por ĝeni la antaŭ^{en}marŝon de latinigo, estas t.n. ne-historisma tendenco je la teorio.

Tiuj, kiuj havas la nomitan tendencon, aŭ forgesis la dialektikan rilaton inter Sinwenz (Nova Skribo, t.e. Latinigo) kaj la estinta evoluo de ĉina lingvo, pro sia troa malplaĉo al Hanz (Malnova skribo t.e. Ĉina Hieroglifo-Ideografio); aŭ la plu^{ne klare vidis} an disvolviĝon de ĉina lingvo — la formiĝo de uneca nacia literatura lingvo — pro troa trakto al la izoleco kaj malsemeeco de dialektoj en Ĉinio. Unuvorte, saĝnas al ili, ĉina Sinwenz aperigaŭ kvazaŭ tute hazarda fenomeno.

Tio ja estas nenio pli ol simpla eraro kaj tial nepre likvinda.

- 2 -

Ni konsideras ke kiel ĉiuj lingvoreformoj okazintaj aŭ okazontaj, ĉina Sinwenz estas ankaŭ rezulto de certa historia kondiĉo. Por pli precize diri, ĝi estas nur ia delonge preparinta salto en la disvolviĝo-procedo. Antaŭĝia formiĝo,

kreski's jam en interno de ĉina lingvo la ĝin naskintaj elementoj sen kiuj oni eĉ ne povas imagi Sinvez kiel hodiaŭ. Same al tio, nuna tempo, kiam ĝi estas jam plene formiĝanta, en ĝi ankaŭ embriiĝas iaj ĝermoj. kiuj je certa momento devos kreskigi tute altigante la aspekton de ĉina lingvo.

Tial, nur kondiĉe ke ni konsideru Sinwenz kiel ian turniĝ-punkton en la progresado de ĉina lingvo k ĉina skribo, ni povas akiri ĝustan komprenon k ĝustan solvon rilate tiun problemon.

- 3 -

Nun lasu nin komenci per tiu demando: kial la malnova skribo ne povas ne doni lokon al la nova pro sia interna kontraŭstaro?

Antaŭ ĉio ni devas scii, ke ^{la} ĝentiman ligo inter Hanz k ĉina lingvo dum estinteco ni ne indas klarigi kiel fenomenon dependan de hazardo. Tio pravas ĉefe pro tio ke en certa tempo nia t.n. amorfa, izola, monosilaba k per ordo signifon-definanta lingvo, estis tre malfacile sin prezenti kiel literaturan lingvon ne en la formo de hieroglifa k ideografia Hanz. La aserto de sveda lingvisto ^{k ĉinalogo} Bernhard Karlgren « Hanz k ĉinlingvo estas ekzistaĵoj nedisigeblaj » estas prefere vera por certa stadio de la evoluo de ĉina lingvo.

Tamen, se ni zorge transrigardus la ĝeneralan tendencon de la progreso de ĉinlingvo precipe la faktorojn nove aperintajn dum lasta centjaro, kiu komenciĝis per la invado al Ĉinio de eŭropaj imperiistoj, ni tuj konvinkiĝos ke la rilato inter Hanz k ĉinlingvo jam esence ŝanĝiĝas — la literaturo de ĉina vere nacia lingvo ne nur povas sed eĉ devas efektivigata ekster la formo de malnova skribo.

Kial?

Tiel: la malnova skribo plu ne povas koincidi kun la novaj

faktoroj k pli k pli fariĝas baro por ilia plua disfloro!

La unua faktoro, kiun ne vidis la malnovaj lingvistoj kiel Karlgren, estas tio ke la ĉina lingvo plu ne povas konsiderata kiel lingvo pure monosilaba.

Paralele kun la kompleksiĝo de socia vivo, la relative malmultaj monosilabaj vortoj en ĉina lingvo iom post iom ne kapablis enteni en si la rapide multiĝantajn novajn konceptojn, k tial estas devigite transformiĝi al polisilabaj. Tiaj polisilabajoj des pli multiĝis ekde lasta jarcento ĝis nun, en nia parola lingvo, ili ekupas jam absolutan superecon super la monsilabaj.

Rezulte de tiu ĉi ŝanĝiĝo, la malnova Hanz tuj perdis sian hieroglifan aŭ ideoglifan signifon por la polisilabaj vortoj k ladas rojon nur de pura fonografio — kvankam ĝi estas plej primitiva kiel fonografio. En plej multaj okazoj ni komprenas la kunmetitajn Hanz-ojn ne laŭ iliaj apartaj signifoj, sed laŭ la de ili reprezentitaj sonoj. Tiamaniere Hanz kiel kripligite fonografio havas jam la eblecon ke eĉ necescon esti anstataŭigata per pli progreseca fonografio t. e. latina alfabeto.

La dua faktoro estas tio ke morfologie ĉinlingvo ekas tendenci transformiĝi al alia tipologio. Certe ni ne rajtas mekanike aserti ke ĝi nepre transformiĝos de lingvo amorfa al lingvo aglutina, tamen estas fakto ke en nia lingvo certaj sendependaj afiksecaj k partikulecaj vortoj, kiuj karakterizas la aglutinajn lingvojn, pli k pli maturiĝas. Tiaj vortoj, en literatura lingvo, pro limigo de malnova skribo (unu Hanz por unu silabo) ili ankoraŭ ne precize montriĝis, sed en lingvo parola, ili estas sufiĉe rimarkeblaj.

La tria faktoro estas la kontraŭstaro inter fremdaj terminoj k Hanz.

Dum lasta jarcento, kaŭze de la grandkvanta importado de

novaj teknikaj k kulturaj konceptoj k faktoj el okcidenta eŭropo, multaj fremdaj vorto ekradikiĝis en nia lingvo. Escepte de tiuj, kiujn ni reprints el japana lingvo, la plejparto de tiaj eŭropaj terminoj, tradukite en Hanz, fariĝis aro da ne-internaciaj kripligitaĵoj (kiel ekz. Inspiration el angla lingvo fariĝis Ianspilichun [烟士披里純]).

Krom tiuj, estas ankoraŭ multaj internaciaj terminoj, precipe scienc-teknikaj, kiuj ĝis nun ne enkondukiĝis en ĉina lingvo. Kaj en estonteco, kiam Ĉinio estos plene liberiginta politike k kulture elsub la imperiista jugado, kiam novaj terminoj amase enfluos en ĉinan lingvon, okazos nepre pli komplika konfuzo dum la tradukado de tiaj terminoj per malnova Hanz. Tiamaniere, nature ni venas al la konkludo: se ni ne volas forlasi la internaciajn terminojn, ni do forlasu la malbenitan Hanz k konduku tiujn rekte en iliaj originalaj formoj — sur la fundamento de internacia latina alfabeto.

La kvara faktoro, ankaŭ la plej grava, estas tio ke Hanz malhelpas la starigon de ĉina vere nacia unueca literatura lingvo.

Neniu povas nei ke ĉina lingvo nun estas disvolviĝanta direkte al formiĝo de unueca nacia lingvo. Sed, kiel ni scias, la formiĝo de ĉia nacia lingvo okazas nur kiel rezulto de intermiksiĝo k unuiĝo de la dialektoj. K por ke la nacilingvo fariĝu reala, antaŭ ĉio ni devas lasi liberan disvolviĝon (literaturigon) al la dialektoj. Sed la malnova Hanz denature ne konvenas en tiu rilato. Ĉar unue se ni perforte «unueciĝos» la dialektojn, kiuj ĝis nun ne havas ankoraŭ sian literaturon, per la Norda Dialekto, kiu estas jam formale literaturigita per Hanz (t.e. Beixua) k ofte konsiderata kiel norma lingvo de Ĉinio, ni nepre fiaskos, pro tio, ke popoloj, kiuj parolas ne-norddialekte estas pli multa je kvanto

k pli supera je ekonomia vivo ol tiuj, kiuj parolas la norddialekton. Due, se ni laŭsone skribas per Hanz la diversajn dialektojn ni ankaŭ sendube fiaskos pro tio, ke tiel farate Hanz perdos baldaŭ sian unuecon, kiu estas la sola ĝia merito de ekzistado. Krome, ei la vidpunkto de tekniko, ĝi ankaŭ ne kapablas rekordi diversajn dialektojn. Unuvorte, la ŝtoniginta Hanz, pro sia denaturaj ecoj, fariĝis nun ĉefa malhelpilo por la literaturo de dialektoj, k sekve fariĝos do malhelpilo por la starigo de esence nacia literatura lingvo de ĉina popolo.

Per la suprecititaj argumentoj ni povas tre evidente vidi, ke la Hanz, kiu en certa tempo ludis pozitivan rolon en la progresado de ĉina lingvo, nun pro la maturiĝo de siaj internaj kontraŭstaroj, iom post iom fariĝis malhelpilo kontraŭ la progreso k ne povas ne transiri al sia kontrasto.

Kaj kiel neevitebla salto, Sinwenz, tiuokaze naskiĝas.

Al ĝia naskiĝo la progreso de « Amasa-Kultura movado » k la neceso de la racia literatura lingvo flanke de popolamaso, servis nur kiel momonto ekstera, instiga, sed ne esenca.

— 4 —

Kompare kun ĉiuj aliaj refomprojektoj de ĉina lingvo, Sinwenz ja posedas rimarkeblan superecon. Nur ĝi k sole ĝi elradike solvas la kontraŭstarojn en ĉina lingvo, t.e. nur ĝi vere konformas al la diritaj novaj faktoroj:

Unue, sub la formo de latina alfabeto, la polisilabaj vortoj en nia lingvo senĝene kreskos k pli rapide forbalaos la monosilabaĵojn; due, helpe de fonografia skribo, la nove naskitaj ŝanĝoj en nia parolo, akiros rimedon klare montiĝi. Kaj dume, al tiaj ŝanĝoj, se ni scipovas fari certajn artajn reguligojn, do estos ne maleble ke ĉina lingvo gajnos pli klaran k racian aspekton dank' al la reinfluo de la racia literatura lingvo — Sinwenz.

Trie, sur la fundamento de latinalfabeto la fremdaj terminoj certe povos libere enflui en Ĉinan lingvon per siaj propraj formoj reordigitaj de la ortografio de Sinwenz. Tiel farante ni ne nur likvidos la necesajn konfuzojn rilate la tradukon de terminoj, sed ankaŭ alproksimigos la terminojn en nia propra lingvo al terminaro internacia.

Kaj la lasta, ankaŭ la ĉefa efiko de latinigita skribo, estas tio, ke la ne-nordaj dialektoj parolataj de ĉ. 250,000,000 personoj, literaturigite akiras vivforton k povos kunfandiĝi kun la norda en estonteco, tute demokratie (egalrajte) sed ne perforte (unu super alian).

Certe^{en} nuna momento, la sukcesoj, kiujn Sinwenz jam atingis, estas ankoraŭ ne kompareblaj kun tiuj, kiujn ĝi devas atingi. Ĉiamaniere, almenaŭ nun, ĝi ne estas altevoluinta perfektaĵo. Tamen estas ankaŭ nenio duba, ke ĝi nepre perfektigos en la praktikado. Nian aserton konfirmos la historio.

— 5 —

En la nuntempa Sinwenz movado, kiel mi diris supre, restas multaj personoj, kiuj havante ne sufiĉan ekkoron al Sinwenz, konscie aŭ nekonscie misiris al ia deflankiĝo, i. e. jenaj du tendencoj estas precipe ofte vidataj : deflankiĝo al Hanz k deflankiĝo al dialektoj.

Tiuj, kiuj ne komprenas la rilaton k diferencon inter skriboj nova k malnova, utiligante Sinwenz, ofte ne konscias sin eligi el kadro^{de} malnova teksto skribita per Hanz (i. e. Wenĵien), kelkfoje ili eĉ laŭlitere tradukis la malnovan en la novan. Ili ne scias ke tia malnovaĵo, kiun komprenas neniu ekster tiuj, kiuj jam legoscias la malnovan skribon, estas ĝuste tiu, kiun Sinwenz devas forigi. Fleksiĝo antaŭ tiu « antikvaĵo » k vesti ĝin per Sinwenz, signifas pereigon al la movado.

Kaj aliaj, kiuj ne vidante la estontecon de Sinwenz, konside-

rante la dialektojn por eterne neŝanĝeblajn, forgesis la unuecajn flankojn de ĉina lingvo kiel tuto, kielcon de unueco de la dialektoj.

Estas ili, kiuj senorde kreskigis multe da «novaj projektoj» k per ili rekordis la plej bagatelajn idiotismojn de iaj plej etaj dialektoj k subdialektoj. Sinwenz disigis je mil pecojn en ilia mano.

Diametre maja estas nia opinio. Nia aplaŭdo al literaturigo de dialektoj estas pure kondiĉa k relativa: la subdialektoj, kiuj eblas esti konsistigataj per sama projekto, ni konsideras kiel unu dialekton k rekordos ilin per unu projekto. Ne nur tio, eĉ inter la projektoj reprezentantaj plej diferencajn dialektojn en tuta lando, ni ankaŭ devas prizorgi ilian relativan unuecon. Ne «disigo por disigo» sed «disigo por unuigo» estas nia principo. Kaj rilate idiotismon, ni opinias, ke ili estas laŭeble evitindaj k proponas anstataŭ ilin uzi la pli vaste uzatajn terminojn «bolantaj en la reala vivo». Ni bone memoru, ke la procedo de literaturigo de la dialektoj estis samtempe procedo ilia purigo k raciigo. Lingvo literatura, kiel superkonstruo de lingvo parola, ne povas k ne devas senkondiĉe konformi al ĉio, kio ekzistas en parola lingvo. En certaj okazoj ĝi estas ebla reinflui al la ^{la}sta.

La deflankigo al dialektoj, same kiel tiu al nianz kondukos Sinwenz-movadon al malesperiga krizo.

- 6 -

Ĉina Sinwenz-movado, kiu rapide progresis dum lastaj tri jaroj, nun estas staranta ĉe decida vojkruiciĝo: ^{ad}pli k pli malvigliĝos kun la malnovaĵoj pruntitaj el malnova teksto, sennombraj «projektoj» k strangaj idiotismoj; aŭ salte antaŭen-marŝos sub ja sistema, konforma al historia evoluo, arta reguligo (starigo de unuecaj projektoj, likvido de malnovaj bagatelaĵoj, kreo de novaj terminoj, esprimoj k gramatikaj formoj.).

Kien do ni iros?



LA LATINIGA MOVADO DUM FORIRINTA UNU JARO EN PEJPINO

— Odeno —

La lat. movado en Pejfino komenciĝis ja post la polemiko pri la amasa lingvo, en 1935. La polemiko postlasis la du problemojn, kiujn oni ne solvis k neniel povis solvi: « laŭ kia parolo krei la amasan lingvon? » k « laŭ kia skribmaniero skribi la amasan lingvon? ». Tial, pro la urĝa postulo de objektivaj kondiĉoj, ĉina lat. movado naskiĝis tuj post la polemiko. La nove komenciĝinta lat. movado unua solvis la du problemojn, kiujn la polemiko de la amasa lingvo neniel povis solvi. — Laŭ kia parolo krei la amasan lingvon? Unuvorte: la patraj lingvoj, kiujn amaso ĉie uzas en ordinara vivo, estas la embrioj de la amasa lingvo en estonteco. Laŭ kia skribmaniero skribi la amasan lingvon? Unuvorte: laŭ nova latina ortografio skribi la amasan lingvon.

Esperantisto estas plej sentema k plej entuziasma por lingva movado: la novan latinan ortografion en sian patrolandon konatigis esp-isto. En Pejfino lat. movadon komencis ankaŭ esp-isto antaŭ ĉiuj. Okaze de la polemiko pri la amasa lingvo, la prezento de la nova latina ortografio atentigis la pejpinan kultur-mondon. Tamen, kia estas la nova ortografio? Tiu, kiu atentis la kreskiĝon de nova kulturo, ankoraŭ ne vidis ĝin k ĉiu avidis priŝci pri ĝi. La nova ortografio de nordĉina dialekto aperis unua en « La Lumo de Esp. », sola esp. periodaĵo en la urbo. La apero de la ortografio kaŭzis grandan intereson inter pejpinaj lingvaj reformistoj, kiuj ĉiuj eklernis ĝin.

Ĉar ĝi estas la sola ilo por akiri novan kulturon, k per kiu oni povas transskribi parolan lingvon racie, science k reale.

Tiutempe oni fondis Ŝanhajan Studsocieton por Latinigi Ĉinlingvon. kiu eldonis la libreton « Lat. de Skribsistemo de Ĉina Lingvo — ĝiaj teorio, principoj k ortografio », koncentriginte ĉiujn fortojn de pioniraj lat-istoj. Ĉiuj flankoj avidis la libreton, malgraŭ ke oni sendis tre malmulte ĝin al Pejpingo post la apero, pro tio iu esp. kamarado alportis por represi ĝin al librejo en Sitan'a Merkato. Apenaŭ la libreto aperis en librejoj en Pejpingo, pejpinga lat. movado kreskiĝis kvazaŭ, ke semo ĝermus pro veninta printempo post vintro. En Pejpingo neniu troviĝis pionira kultura junulo, kiu ne akceptis influon pro tiu ĉi libreto: el la libreto li akiris la priscion de la lat., komprenis pli bone, kiel konstruu amasan kulturon, k komprenis pli profunde la komision de pionira intelektulo. Por marŝi de teorio al praktiko, la pejpinga pionira intelektulo kombinis la subjektivan forton kun objektivaj postuloj, k puŝis antaŭen pli organize k pli projekte la lat. movadon por la nova kleriga movado de nova kulturo.

Tiam Ĉinhua Lat. Studsocieto k Studsocieto por Latinigi Amoj'an Dialekton estis fonditaj. « Pejpinga Lat. Duonmonata » fondita de Ĉinhua Lat. Studsocieto aperis neatendite samtempe kun « Lat. Monata » de Ŝanhajo k ili lavis la avangardajn standardojn de lat. movado tuj post « Sestaga Ĵurnalo por Gardi Lat. » en la malproksima oriento de Sovetio. Post tio oni eldonis daŭre la libretojn « Lat. de Nordĉina Dialekto », « Kio estas Lat. ? » ka., kiuj plenumis la postulon lerni lat., de ĉiuj flankoj. La membroj de Studsocieto por Latinigi Amoj'an Dialekton estis ^{la} sudĉinianoj loĝantaj en Pejpingo; pro ke ili konsciis, ke la popolo en Amoj'a regiono estis forlasita ekster kultura sfero de antaŭ kelkmil jaroj, k ke ĉina skribo ne estis aĝo de Amoj'a amaso, do la lasta (la tuta sudĉiniano ankaŭ) havas

nur parolon, sed ne skribon antaŭ delonge, k ke la popolo postulas skribon k kulturon pli avide ol nordĉiniano, pro tio ili kreas la ortografion por la regiono de Amoj'a dialekto. Antaŭ ol oni ne ellaboris k ne publikigis la provaĵon de la ortografio, neniu sciis pri tio. Nur post la fondiĝo de «La Speciala Eldono de Lat.» unu-an de januaro 1936-jara, oni eksciis pri la ekzisto de tiu organizo. La eldonaĵoj kiuj tiam prezentis k propagandis lat., k kiujn ni ne povas forlasi, estas «Fandforno», la aldono de la ĵurnalo «Kinpao», «Cinhua Semajna», «Literaturo Naci-defenda», «Uragano», «Tatun Semajna» k «Literatura Zono», la aldono de «Kiokin Tagĵurnalo». Poste oni fondis en «Literatura Zono» la specialan kolonon «Lat. Fronton», kiu donis plej bonan influon al la pejpinga lat. movado.

Dum la somero k aŭtuno de 1935, lat. studsocietoj estis fonditaj en Pekina Universitato, Instruista Universitato, Tatun Liceo, Unua Knabina Liceo, Dua Knabina Liceo, Respublika Universitato kaj k Pejpinga Studsocieto por Latinigi Ĉaoĉou'an Dialekton estis ankaŭ fondita. Kiam la novembro venis, tiam oni konsciis la bezonon disvolvi la movadon per unueca forto, pro tio la pejpingaj lat. societoj malfermis la konferencon de la reprezentantoj el la societoj k fondis Pejpingan Lat. Studsocion; la fondiĝo de la societo lasis la pejpingan lat. movadon eniri en novan etapon.

Post nelonge eksplodis «Decembra Movado», k^{iu} bruligis la tutan landon kiel herbeja brulado; la junulo de ĉie ekkonis el la spertoj de sia agado, kiel propagandu al popolo, k kiel organizu popolon, por ke ĉiuj komprenu ekzakte pri la naci-savado, konsciu siajn suferojn k havu la daŭran entuziasmon por batali kontraŭ x x-ismo. La sola timo estas doni al ĉiuj la ilon por kompreni mondon k tuŝi kulturon. La lat. movado disvastiĝis, ^{k disvolviĝis} kombinate kun la naci-emanipa movado, sub novaj kondiĉoj. Tiam la grupoj por studi k disvolvi la lat. es-

tis vaste organizoj ne nur en ĉiuj lernejoj, sed ankaŭ

savaj societoj en ĉiu socio. Tiutempe Pejpinga Lat. Studsocieto komitis k eldonis la tre kompletan « La Programon por Studi Lingvon » por plenumi la postulon de ĉiuj organizoj.

En la januaro de tiu ĉi jaro (1936 — trd.) la studentoj de Pejpingo k Tiencin organizis « Propagandan Grupon por Suden Marŝi » k eniris en kamparajn vilaĝojn por propagandi pri la naci-savo; malsupre malvarmega ĉielo k sur neĝo ili fondis lat. studsocieton k instruis iat. al la membroj, kankaŭ al la inteligentuloj en kamparaj vilaĝoj k la instruistoj de vilaĝaj lernejoj; la studentoj ĉiam interrilatigis kun ili. Post tiam, kiam la propaganda grupo revenis al Pejpingo, oni komprenis pli profunde la gravecon de lat. Post tio preskaŭ ĉiuj organizoj havis societojn por studi lat.. Lat-istoj, kvazaŭ ĉeluloj, agadis, enirinte profunde en ĉiu naci-saven organizon. Tiutempe en « Pejpinga Nova Ĵurnalo » aperis « Lat. Semajna », kiu estis redaktata de la lat. studsocieto de Instruista Universitato, k kiu donis tre grandan influon al ĉiuj flankoj k faris pli ol tricent da korespondaj retoj. Bedaŭrinde oni perfortis ĉesigi la eldonon post n-ro 16-a.

Malgraŭ tio eldonaĵo ankoraŭ pliigis rapide: krom « Pejpinga Lat. Duonmonata » k « La Speciala Eldono de Lat. » troviĝis « Lat. Ĵurnalo » redaktata de Pejpinga Lat. Studsocieto; Reforma Klubo fondis en la marto la inoktavan lat. gazeton « Reformon », pri kiu ni devas skribi en oraj literoj, ĉar en Ĉinio oni neniam eldonis duan tiel dikan ĝeneraligitan gazeton kiel ĝi ĝis nun, kiam ni skribas tiun ĉi artikolon. Krome troviĝis « Antaŭposteno » redaktata de Pejpinga Studsocieto por Latinigi Ĉasĉou'an Dialekton, k « Studo pri Lat. » eldonite post kelkaj monatoj. La lat. studsocieto en Pekina Universitato eldonis « Novan Mondon »; Orienta Lat. Studsocieto en Respublika Universi-

tate — la libreton « Stahanova Movado » ; la lat. studsocieto en Ĉinhua Universitato — « Indekson de Latinigitaj Silaboj — Ĉinaj Skriboj » k plej kompletan « Abocolibron de Lat. ». Krom tio en multaj liceoj oni eldonis lat. murgazetojn. Tiujn ĉi eldonaĵojn oni vigle aperigis spite de tre mizera ekonomia stato. Samtempe en ĉiu popola lernejo aldone fondita je ĉiu lernejo, oni instruis lat.. Post la disvolviĝo dum unu jaro, lat. ne nur estas havaĵo de intelektulo, sed ankaŭ estas donita al vasta nealfabeta amaso tra la manoj de intelektulo : eniris per gigantaj paŝoj en fabrikojn, kamparajn vilaĝojn, magazenojn, soldatejojn k stratojn.

Poste la lat. movado disvolviĝis tre rapide, sed subjektiva forto ne pliiĝis tiel rapide, sekve la paniko de la ieĝaĝo okazis ĉie. Se ni ekzamenas la brulantan lat. movadon dum pasinta unu jaro, ĝi estis vana k malplena k ĉiu proĉedo ankoraŭ ne havis etapojn k planojn : nu ni diru pri la eldonado, nur du periodaĵoj povis aperi ĝis nun — « Pejpinga Lat. Duonmonata » redaktata de Pejpinga Lat. Studsocieto (jam aperis je n-ro 19-a ; depost vol. dua aliĝis monata k aperis je n-ro kvara.) k « La Speciala Eldono de Lat. » redaktata de Pejpinga Studsocieto por Latinigi Amojan Dialekton (aperis je n-ro 12-a) ; nur tri libroj aperis : (1) « Abocolibro de Lat. » (kompilis Ĉikuan), (2) « Elementa Lernolibro de Lat. » (kompilis Ŝii), (3) « Marfermu Okulojn k Vidu ! » (kompilis Adou k Odeno ambaŭ). Kiam en some-ra libertempo la studentoj de Pejpingo k Tiencin kampadis sur Monto Ĥianŝan'a, nur tiam oni malfermis la kunsidojn por disvastigi la teoriojn de lat. : unue lekciajn k due konversacian kunsidojn. Ilia subjektiva forto estis malgranda, kvankam la kunsidoj donis grandan influon.

Pro tio, ke la lat. societoj en Pejpingo disvastiĝu pli rapide k pro tio, ke la tutlanda lat. movado disŝiru projek-

te k laŭorde tiun ĉi malfacile konkereblajn kondiĉojn k dis-
vastigu akcele. oni kunvokis en la novembro la konferencon
de la tutaj membroj, kiu rezoluciis unuanime : (1) reorga-
nizu Pejpinan Lat. Studsocieton per Pejpina Folio de Ĉina
Lat. Studasocio ; (2) kritikinte rigore la laborojn dum pa-
sinta unu jaro k konkerinte ĉiujn erarojn dum pasinteco,
eniru en novan etapon en bazo de la spertoj k instruoj aki-
rintaj dum forinta unu jaro. — elĉinigis —

Mi montras jene la proprajn substantivojn laŭ la na-
cia ortografio, kiujn mi literis supre laŭ esp. ortog-
rafio. — trad.

Sitan — Sitan	Cinhua — Cingxua	Kinpao — Gingbao
Tatun — Datung	Kiokin — Gyogin	Čaoĉeu — Čaozzhou
Ĉikuan — Zĥuang	Ŝii — Shi	Ĥiansan — Xiangshan

INTERNACIA LATINIGA KLUBO

- 1 Nia klubo celas interligi lat-istojn de ĉiuj landoj k
interŝangi la teoriojn k spertojn pri lat. movado.
- 2 Ĉiuj, kiuj aprobas nian celon, povas fariĝi la mem-
bro de nia klubo.
- 3 Nia klubo eldonas «Latinigon» k faras la laborojn,
kiujn ni opinias konvenaj al ni.

- Nia adreso : S-ro Saitoo-Hidekatu, Yamagata-ken,
Higasi-tagawa-gun, Yamazoe-mura, JAPANIO
- Tiu ĉi gazeto aperas du fojojn en ĉiu jaro.
- Prezo de unu ekz. : 28 senoj por Japanio k Ĉinio ;
33 senoj por aliaj landoj (inkluzive sendpago).
- Abonpago : 1 jeno por 4 n-roj, por Japanio k Ĉinio ;
1 jeno 30 senoj por aliaj landoj.



LATINIGA MOVADO DE ĈINA LINGVO EN SIAMIO

La Bi

Post la grandiozaj 1.29 k 12.16 movadoj de Pejpinga studentaro iuj inteligentuloj kunportis al Siamio lernolibrojn de latinigo de ĉinlingvo k propagandis latinigon inter siaj amikoj. Samtempe sur la plej progresemaj gazetoj, ekzemple «*Le Sinc pri V-vo*» k. a. tre vaste akceptitaj de ĉinaj inteligentuloj en Siamio, oni ofte aperigis propagandajn artikolojn pri latinigo ; pro tio latinigo estis konita tagen post tago de ĉinaj inteligentuloj. kiuj ne deziras fariĝi skiaĵojn senpatriajn.

En la printempo de pasinta jaro ni, kelkaj latinigistoj komencis organizi la latinigan societon ĉe la ĉefurao Bankoko, nomatan «*Elementa Voĉo*», kies membroj estis komence dudek k kelkaj, sed post du monatoj multiĝis al 50—60.

Niajn laborojn mi resumas jene :-

- (1) Organizas ĉinajn latinigistojn en societon per ĉiuj niaj ebloj.
- (2) Amplekse varbas membrojn por fortigi nian forton k disvastigas rapide la movaden.
- (3) Faras propagandon inter niaj amikoj k sur ĉi-tieaj ĵurnaloj k gazetoj.
- (4) Aranĝas kurson por la membroj, kiuj ankoraŭ ne bone komprenas latinigon. K.t.p.

Ekde la organizo de «*Elementa Voĉo*» oni koniĝis pli k pli pri latinigo. k fariĝis ĝiaj sinceraj amikoj.

La movado disvastiĝas k prosperas kiel kreskaĵoj en bela printempo : dum duonjaro fondiĝis proksimume dudek

societoj en diversaj lokoj de Siamio k' kelkaj nokt-kursoj ankaŭ.

Antaŭ nelonge nia societo «Elemente Voĉo» eldonis kelk-mil ekzemplerojn da lernolibroj por la komencanto en lernejoj k' ili estas bone akceptata.

En lastaj kelkaj monatoj la movado estas ne vigla pro la malpermeso de latinigo en Ĉinio. Sed ni ne malesperas, ĉar la malpermeso estas antaŭviciita malhelpo. Por la lumeco de nia estonteco ni nun laboradas kaŝe.

Ankaŭ la naci-perfiduloj k' hundaĉoj de «-istoj» famas, ke latinigo estas ilo de danĝera partio, k' tiuj, kiuj alproksimiĝas al ĝi, estas sendube danĝeruloj. Tamen, ĉiam venkas vero; oni klarege komprenas, ke ĝi estas nur ilo, per kiu subpremataro kontraŭbatalas al ekspluatantoj, tial neniu povas perforte malhelpi la movadon.

Entute en Siamio ekzistas kelkcent da latinigistoj, el kiuj 70 procentoj estas inteligentuloj k' la alaj estas vendistoj k' laboristoj.

Verdire, la movado estas marŝanta antaŭen, plenumante la postulon de nuna epoko.

Laboru, laboru, fratoj! Venko estos nia!

Sovetiaj k-doj! Vi povas aboni tiun ĉi gazeton per esp. aŭ lat. eldonaĵo aperinta en via lando, anstataŭ abon-pago. Abonu vi mem k' abonigu viajn amikojn.

LA VERKARO DE PUŜKIN eldonita en latinigita ĉina lingvo

— Havarovsko, 31. jan., telegramo de Tas —

Malpoksima-orienta Eldonejo, okaze de la datreveno centjara de Puŝkin, eldonos lian verkaron ĉinlingvan, kiu estos presita en ĉina skribo k' latina alfabeto. Ties ĉefkompilinto estas ĉina poeto Cun Aimei (Cung Aimei aŭ Cung Can) k' li mem faros antaŭparolon, en kiu li pridiros pri la vivo k' laboro de Puŝkin.



LA LATINIGO de ANAMA LINGVO.

Hidek.

La latinigo de anama lingvo komenciĝis en 17-a jarcento. En tiu epoko eŭropanoj : hispanoj, francoj k nederlandanoj, precipe komercistoj k kristanaj misiistoj el tiuj nacioj, enmigris Hindo-ĉinan Duoninsulon. Tiam la diferenco inter skrib-sistemoj malhelpis ilin komerci kun la indiĝenoj k propagandi kristanismon al la anamoj, ĉar tie oni uzis ĉinan skribon. Pro tio franca misiisto Aleksandro de Rhodes (1591 — 1660), dum sia propaganda restado en Anamio, ellernis profunde la anaman lingvon k kreis ia lat. ortografion de la lingvo. La tuta anamo baldaŭ akceptis lian skribsistemon pro facila lernebleco : ĝi estas tiel facile lernebla, kiel oni finas ellerni ĝin post nur du monatoj.

La anama alfabeto havas 12 vokalojn : a, ä, â, e, ê, i, y, ô, ô, o', u, u' k 17 konsonantojn : b, c, d, ĉ, g, h, k, l, m, n, p, q, r, s, t, v, x.

Tiu ĉi latina alfabeto anstataŭis la antaŭan, ĉinan skrib-sistemon en multe da flankoj. Depost tiam ĝis nuntempo oni eldonis ĵurnalon, Biblion k aliajn per la alfabeto k instruis la alfabeton en lernejo. Ni scias, ke la Biblio anam-lingva eldonita en 1918 estas ankaŭ presita per la nova alfabeto.

Tamen, ĉu la ĉina skribo tute pereis en Anamio ? En « Universala Alprezo de Latina Alfabeto » eldonita de Ligo de Nacioj, oni diras : « Fakte oni uzas tiun ĉi latinan alfabeton, anstataŭ la antaŭan skribon, kiel solan literon, en lernejo ka. [en Anamio]. » Sed tiuj ĉi linioj estas tre du-

bindaj, ĉar ni havas tute alian raporton ol ĝi, pri tiu ĉi temo, informitan de anamo mem. Laŭ la raporto la anamo uzis ankaŭ la malnovan skribon post la latinigo. Eĉ nun oni uzas la ĉinan skribon kune kun la latina alfabeto precipe en kamparo k la studprogramo de ĉiuj lernejoj enhavas la lecionon por la ĉina skribo.

La anamo uzas, escepte veran ĉinan skribon, la skribon, kiun la anamo mem kreis, imitante la ĉinan skribon, kiel japano. Jen kelkajn ekzemplojn de la anamaj «ĉinaj skriboj»:

anama skribo	ĉina skribo	ĉindevena elparolado	pure anama elparolado	signifo
楯	肩	kiĉn	vaj	ŝultro
胆	額	ngăch	trân	frunto
館	館	quán	—	domo
袂	衣	y	ño	vesto
肉	肉	nhục	thịt	viando
萍	萍	bình	bèo	lemno

x

x

x


Profitante la okazon mi diros iom pri la lingva stato en Anamio.

La anamo parolas k skribas anaman lingvon kompreneble. Krome ili uzas francan k ĉinan lingvojn, pri kiuj mi skribos resume.

Apenaŭ la anamo povas legi k skribi en la nacia lingvo en elementaj klasoj, ili devas lerni preskaŭ ĉiujn lecionojn en la franca lingvo escepte la lecionoj de legado k verka- do en la nacia lingvo. La lecionoj en la franca lingvo oku- pas tri kvaronojn el la lernado de anama lernanto. Tie ĉi ni devas rememori, ke Anamio estas franca kolonio.

Ne malgranda parto de la anamo, parolos en la ĉina ling- vo ankaŭ. En estinteco, dum longa tempo la anamo estis

(daŭras al la malsupra parto de
la sekvanta paĝo — 33 —



LA INFORMETO PRI NUNTEMPA SOVETIA

LATINIGA MOVADO

— Moskvo, 21-an jan., telegramo de Tas

Sovetia Lat. Studasocio, 20-an de la januaro en Moskvo, majfelmis la konferencon, je kiu la vicprezidento de la asocio. Korkomasef raportis

al la ĉeestantoj pri la laborado dum 1936 k la plano de 1937. Laŭ la raporto Sovetio jam latinigis la skribosistemojn de 70 naciaj lingvoj k 25 milionoj de popolo nun havas siajn alfabetojn. En 1936 la asocio studis pri la ekzaktaj ortografioj de 26 lingvoj. Unue oni kreis 12 specojn de novaj ortografioj k due eldonis la vortarojn de rusa k aliaj naciaj lingvoj. Multaj nacioj ne havis siajn alfabetojn antaŭ la Milito. En nuntempo oni sukcesis krei facile lerneblajn skribosistemojn pro la akcepto de latina alfabeto. Lastjare en Sovetio 617 presejoj okupis sin por la laborado faradi novajn presliterojn. Oni planas eldoni vortarojn de la nova alfabeto kiel laboron en 1937.

regata de la ĉino k ankaŭ nun multaj ĉinoj loĝas tie, tial la anamo estis profunde influita de la ĉino, ja ĉiniĝis. Eĉ nun preskaŭ ĉiuj anamaj moroj k kutimoj estas tre similaj al la ĉinaj. Sekve tio estas nenja mirindaĝo, eĉ se ili parolas la ĉinan lingvon. Nun iuj klopodas revivigi la lingvon k 1934 eldonis ĉina-anaman vortaron.

Mia skribaĝo estas tro simpla pro tio, ke mi preskaŭ ne havas la materialojn. Mi dankas al s-ro Macuba, kiu aldonis gravajn partojn al miaj tre malriĉaj materialoj. Je la fino mi esperas al la legantoj tion, ke tiuj, kiuj scias pli detale pri tiu ĉi temo, skribu pli kompletan k utilan raporton por nia gazeto.

• Ĉu en Sovetio Oni Latinigas la Dialektojn?

V. Kolĉinski


Al mia supra demando afable respondis k-do Kolĉinski. Tiun parton de lia letero mi publikigas ĉi sube. Mi tre esperas, ke sovetiaj k-doj pli nude informu nin pri siaj valoraj spertoj en la iat-movado. — Ĵelezo (Ŝanhajo)

Vi demandas, ĉu en Sovetio oni latinigas la dialektojn?

Tie, kie la dialektoj estas tre malsamaj, oni konsideras ilin kiel apartajn lingvojn kaj ili disvolvas sian skribon tute aparte, ankaŭ ricevas apartan literaturon. Ekz: kazanaj (apudvolgaj) tataroj kaj krimea tataroj estas konsiderataj aparte, oni konsideras iliajn dialektojn kiel du apartaj lingvoj, kaj por ĉiu estas kreata aparta literaturo.

Alia ekzemplo: la dialektoj de «montaj» kaj «hebejaj» marioj estas konsiderataj kiel apartaj lingvoj, ankaŭ la dialektoj «ezrja» kaj «mokŝa» de mordvoj.

Fine, konsideru ke ĝenerale ĉiuj «tjurko-tataj» lingvoj (tatara, tjurka, turka, uzbeka, turkmena, kazaka, kingiza, kaŝgara, baŝkira, karakalpaka k.a.) ne estas multe pli mal-similaj inter si ol la ĉinaj dialektoj. Male, ili estas tre similaj intersi, havas tre multe da komunaj vortoj kaj komunaj reguloj. Tamen ili estas traktataj kiel apartaj lingvoj, por ĉiu estas ellaborita aparta gramatiko kaj disvolviĝas aparta-lingva literaturo. Ĝi ne estas naci-ista literaturo. Male, la literaturo de ĉiuj sovetiaj popoloj estas tre internacieca. Sed oni uzas la lingvon plej



LA LATINA kaj GERMANA ALFABETOJ en GERMANIO

D-ro Kuwaki-Gen'yoku

Tiuj, kiuj komencas lerni germanan lingvon, precipe se ili lernis anglan aŭ francan lingvon pli antaŭe, sentas lerni malfacile en unua paŝo pro germana alfabeto. Oni ellernas la kursivaĵon de la alfabeto pli malfacile ol la presitaĵon. Legi la germanan alfabeton estas facile, sed skribi ĝin estas malfacile. Tamen, en Germanio scienca libro estas presita per latina alfabeto antaŭ delonge, kiel en aliaj landoj, aliflanke libro de literaturo: novelo, poemo, ka., k populara legaĵo estas ĝenerale presita per la germana alfabeto; pri tio oni jam scias sufiĉe.

Scienca libro estis kutime presita per la latina alfabeto k libro de literaturo — per la germana; tamen, libro de filozofio situaciiis inter tiuj ĉi ambaŭ: ekzemple la historio de filozofio verkita de Kuno Fischer (fiŝer) estis presita per la germana alfabeto k la verkaĵoj de Erdmann, Zeller k Windelband (erdman, celer, vindelbant) — per la latina. El la verkaĵoj de Windelband, la historio de filozofio k la ĝenerala trakto pri filozofio estas presitaj

facile kompreneblan por la popolo.

Ellaboro de komuna lingvo estas farita nur tie, kie diferencoj inter la dialektoj estas tiom malmult-signifaj ke ĉiuj popoloj facile komprenas la «literaturan» lingvon formitan (baŝkiroj, turkmenoj), ĉu per plipopularigo de jam ekzistanta «literatura» dialekto aŭ plikomplektigo de la ĉefa dialekto.

per la latina alfabeto, sed ĉi verkaro, « Präludien » (preludin) estas per la germana, ĉar « Präludien » havas pli-malpli popularan aŭ literaturan stilon, ŝajnas al mi. Tia diferenco, kia mi diris supre, ŝajne ekzistis ĝenerale en tiu lando.

Tamen, post la Mond-milito ĉio fariĝis internacia : akompanante tion, la latina alfabeto, kiu estas komuna tra la mondo, prosperiĝis k en ĵurnalo la kolonoj presitaj per la alfabeto fariĝis pli multaj : ĝis tiam preskaŭ nur la artikoloj pri ekonomio estis presitaj per la alfabeto ; post tiam aliaj kolonoj, eĉ literaturaj ankaŭ fariĝis presitaj per la alfabeto. La libroj de novelo per la alfabeto estis multe eldonitaj. La anonctabulo^o demagazeno per la alfabeto pli-multiĝis. La anonctabulo ŝajne donas tian impreson al la germano, kian ni, japanoj akceptas de la anonctabulo per latina alfabeto aŭ angla lingvo anstataŭ japana litero aŭ ĉina skribo. Aliflanke kun tio la kontraŭstaro al la latinigo aperis forta : oni fondis la societojn por konservado de la germana alfabeto k propagandis por la konservado. Antaŭ ĝuste dek jaroj en Berlino mi vizitis la ekspozicion, kiu okaziĝis por tiu ĉi celo. Tie, ĉe multaj materialoj iu paroladis tion, ke se ni uzos nur^{la} latinan alfabeton, oni povos neniel akcepti nian landon kiel Germanion. Mi trovis la rememorigajn kartojn, en kiuj oni enpresis la vortojn de famaj antaŭuloj. El la vortoj mi trovis tion de Kant k Goethe (gete). Laŭ mia memoro Kant diris en la karto, ke se oni legas nur la latinan alfabeton anstataŭ la germanan, liaj okuloj laciĝos pro diferencigi unu la alian diversajn alfabeterojn. Mi opinias, ke kontraŭe la germana alfabeto estas pli malutila por ni aj okuloj ol la latina, ĉar la antaŭa postulas de ni diferencigi alfabeterojn per nur tute malgravaj malegarecoj : ekzemple f k f. Observinte la ekspozicion k volante reveni, mi aĉetis diversajn eldonaĵojn k mi diskutetis

kun la vend-komisiitino. kiu aspektis kiel intelektulino; mi revenis bedaŭrinde lasinte librojn aĉetitajn, ŝajne pro tio, ke mi uzis en la konverzacio kun ŝi la fremdan lingvon, kiun mi povas paroli ne sufiĉe flue, k mia cerbo laciĝis k nebuli-^{gis.}

Tiun ĉi ekspozicion okazigis iuj istoj, ŝajnas al mi. Tamen por ĝeneraluloj ankaŭ, la germana alfabeto estas pli intima: mi trovis ofte la alfabeton en la kalkulo de pensiono. Al mi ŝajnas ke, tiu ĉi fakto estas simila al tio, ke la japano ĝenerale intimiĝas al hiragana-skribo k ne ŝatas katakana-skribon. Kvankam katakana'on kutime uzas la japana studanto de ĉina klasikaĵo k publika oficiisto, literaturisto k ĝeneralulo uzas pli ŝatante hiragana'on. La rilato inter tiuj ĉi ambaŭ literoj estas ĝuste simila al tio inter la germana k la latina alfabetoj. Alivorte ni trovas iom similecon inter tiuj ĉi ambaŭ. kvankam ni ne povas apliki la rilaton inter la alfabetoj en Germanio, al la rilato inter ^{ia}ĉina skribo, japana litero k latina alfabeto en Japanio.

Lastatempe la germana alfabeto rimarkinde prosperiĝas, kiel ĉiuj scias. Pli antaŭe la libro pri scienco estis ĝenerale presita per la latina alfabeto; nuntempe ekzemple « Deutsche Physik » (germana fiziko) estas per la germana alfabeto k laŭ onidiro la gazeto « Deutsche Mathematik » (germana matematiko) ankaŭ. Ni impresiĝas tiujn eldonaĵojn iom strangaj pro ĝisnuna kutimo, kvankam ni ne sentas preskaŭ malfacile legi ilin. La libro de filozofio estas nun presita per aŭ la germana aŭ la latina, sed la presitaĵ per la germana alfabeto plimultiĝas pli k pli, ŝajnas al mi. En la gazetoj pri filozofio oni ankoraŭ uzas la latinan alfabeton, malgraŭ ke ilia enhavo estas germana-alfabetema.

Mi ne volas trakti plu pri tiu ĉi temo. Sed rigardante tion, k malfacile solvablaj problemoj troviĝas multe inter

la preskaŭ samaj alfabetoj laŭ la strukturo: la latina k germana, oni ne povas ne akcepti tion, ke la diversaj mal-facilecoj per solvo troviĝas en japana lat. movado. Sekve mi opinias ke oni devas certigi sufiĉe la celon de lat. movado. Povas esti tio, ^{ke} mi estas ne ĉiam samopinia pri la celo kun aliaj lat-istoj. — eljapanigis —

EĤOJ

Ö K-do E.K. Drezen — Kun plezuro mi tralegis vian cirkule-
ron de februaro 1937 koncerne la eldonon de la gazeto
«Latinigo». Ni kun plezuro sendos al vi dokumentojn kaj
materialojn. Informu, ĉu vi komprenas la rusan lingvon:
En Sovetio la aferon prizorgas speciala Centra Komitato
de la Latinigo. Ankaŭ ĝi estas interesita pri via laboro.
Ne restas tempo por sendi al vi nun ion. Informu pli deta-
le, kio vin interesas. Sendu la unuajn n-rojn de via gazeto.

Ö K-do Ĵelezo — Kun granda ĝojo mi informiĝis pri la apero
de «Latinigo». Mi certe ĝin subtenas per miaj fortoj.
Mi povas sendi al vi leteron de rusa k-do, en kiu li rapor-
tas al mi pri lat-movado en USSR. Pri la apero de «Lati-
nigo» mi jam letere informis k-don Tikos, petante ke an-
kaŭ li multe kunlaboru al la gazeto. Nuntempe ni devas
per ĉiuj fortoj serĉi kunlaborantojn en Sovetio k Turkio.
Tio estas tre grava, ĉar tieaj k-doĵ povos liveri al ni mul-
tajn spertojn, kiujn ni urĝe bezonas. La apero de «Lati-
nigo» estas epoko-faranta afero en la lat-historio en la

Oriento, mi deziras al ĝi grandan sukceson.

O K-do H. Schürmule — Mi kaj aliaj k-doĵ de latiniga movado tre ĝojas pro la fondiĝo de Internacia Latiniga Klubo k pro la aperiĝo de «Latinigo Internacia». Ni ege volas scii pri ĝiaj ekonomia stato k ebla cirkulado-kvanto. Laŭ mia kalkulo, se ĝi ne estos tro faka, sole en Ĉinlando ĝi povos akiri abonantojn ne malpli ol 50 personoj.

O K-do Katō-T. — Kun granda ĝojo mi ricevis la prospekton de la gazeto «Latinigo». Mi tre volas skribi ion, sed mi bedaŭras ke mi ne havas talenton. Koncerne la latinigan movadon mi mem havas nur malmulton da spertoj, kvankam mi staras tute aprobe ĉe ĝia flanko. En nia loka kunsido de esp. sin trovas kelkaj «kanamozi»-istoj, kun kiuj mi havas okazojn diskuti pri skribreformaj movadoj. Se via gazeto eldoniĝos, mi tuj fariĝos ĝia abonanto, kaj ankaŭ peros vendadon al lokaj esperantistoj. Mi finas, denove petante pardonon pro mia malplenumo de via peto, kaj samtempe esperante ĝian tutprosperan estontecon.

O K-do Isiga-O. — Kun plezuro mi hodiaŭ ricevis vian leteron kaj gratulas kore vian projekton eldoni la «Latinigon», ĉar ankaŭ mi ofte esperis la aperon de tia organo. El kore mi al ĝi esperas bonan sukceson kaj mi volas kunlabori laŭeble por la komuna celo de latinigo. Atendante la aperon de brila unua numero de «Latinigo».

O K-do Takeuti-Z. — Mi ricevis vian karton, kiu afable invitas min kunlabori al la nove fondota gazeto «Latinigo». Mi estus tre feliĉa k kontenta, k mi povus kunlabori al ĝi laŭ via invito, sed bedaŭrinde mi ankoraŭ restas tiel analfabeta k malkompetenta en la lingvoreformaj problemoj, ke mi ne povas kuraĝi diri ion publike. Esperante pluan prosperon de via valorega entrepreno.

O K-do Kawasaki-N. — Kun ĝojo mi legis vian leteron kaj tutkore aprobas vian intencon.



De la Redaktoro

Tio estas granda ĝojo por mi, ke mi nun sendas al viaj manoj la n-ro'n unuan de la nova gazeto. Tiu ĉi povis aperi helpe de vi, la orientaj lat-istoj, precipe ĉinaj kaj japanaj kamaradoj. Midankas al vi tutkore.


Mi bedaŭras tion, ke mi aperigis nur la mallongajn artikolojn pri sovetia lat. movado en tiu ĉi n-ro. Sed por n-ro dua estimata esp. teoriulo k fervora lat-isto k-do Drezen k k-doĵ en Centra Komitato de Latinigo en Moskvo skribos interesajn artikolojn. Legantoj, atendu aŭskulti pri la utilaj spertoj de la sovetiaj k-doĵ.

Mi petas helpon por nia laboro ankaŭ al la lat-istoj de aliaj landoj krom Ĉinio, Sovetio k Japanio. K mi petas al ĉinaj kaj japanaj k-doĵ tion, ke konatigu al ni la alilandajn lat-istojn, se vi konatiĝas aŭ kores-

pondas kun ili.

Mi atendas viajn sendetenajn kritikojn k dezirojn al nia gazeto: ekz., kian tendencon el nia gazeto ni kreskigu; kian parton el ĝi perfektigu; kian artikolon vi deziras legi; kia estas la temo, pri kiu vi deziras scii plej avide, ktp.. Mi klopodos kondukti laŭ via kritiko k plenumi vian deziron laŭeble. Tiu ĉi gazeto ne de la redaktoro, sed vi, internaciaj lat-istoj. Sekve mi povas direkti ĝuste k disvolvi tiun ĉi gazeton, nur ricevinte viajn konsilojn.

La redaktoro estas komencanto en esp-verkado, malgraŭ ke mi komencis lerni esp. antaŭ kelkaj jaroj. Pro tio mi timas, se en la artikoloj verkitaj k tradukitaj de mi mem, vi trovos gramatikajn erarojn. Se jes, korektu, mi petas.



Traduki

la artikolojn.

kiuj aperis en nia gazeto,
en japan^{an} lingvon estas
malpermesite. Se vi dezi-

ras traduki ilin, proponu al ni.

Se vi tradukos ilin en alian lingvon, nepre sendu du ekz.
de la eldonaĵo, en kiu vi aperigos nian artikolon, tuj post
ĝia eldono.

Interŝanĝo de Lat. Materialoj

Ni deziras interŝanĝi lat. materialojn, precipe lat. lerno-
librojn aperintajn en via lando, per japanaj. Se vi sendos
ilin al ni, vi garantie ricevos niajn sendaĵojn.

Tamen, ne sendu la eldonaĵojn aperintajn en Sanhajo
k Pejpino, ĉar ilin kutime sendas al ni niaj korespon-
dantoj.

Reklamo de Korespondo

Ĉu vi deziras korespondi kun alilandaj lat-istoj? Se
jes, ni aperigos senpage la reklamon por vi en tiu ĉi gaze-
to. Tamen, vi devas garantie respondi al ĉiuj, kiuj propo-
nos al vi korespondadon.

Sendu Manuskripton

por la n-ro dua de nia gazeto. Ni akceptos kun plezuro ĉiuspr-
cajn manuskriptojn pri lat.. Tradukaĵo estas ankaŭ akceptinda.
Sendu ĝin tiel, kiel ni povu ricevi ĝis la fino de la septembro. Ni ri-
cevas vian sendaĵon de Ĉinio post 2. unu semajno k Sovetio ĉ. 20 tagoj.

昭和12年6月17日印刷

昭和12年6月20日發行

編集・印刷
兼發行

齋

藤

秀

一

山形縣東田川郡山添村東茂屋

字寺廻り89 振替：仙台2542番